



Pos-Amiko

IJK 2022, lundo, numero 44

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

Biciklu trans la landlimoj!

Hodiaŭ estos ekskurso, kiu ofte transiros landlimojn. Por reveni al Nederlando atentu, ke vi transiru landlimon paran kvanton da fojoj, ĉar alie vi restos en Belgujo.

Kiu foiro venkos?

La averaĝa IJK en la pasintaj jaroj havis nul foirojn. Sed 2022 estas granda escepto, ĉar okazas ne nul, ne unu, sed eĉ du foiroj! Tiu lukso ankaŭ kreas siajn novajn problemojn.

En renkontiĝo kun nul aŭ unu foiroj oni neniam miras, kiu el ili estas la pli bona, pli amuza aŭ pli plena je trinkaĵoj. Sed kiam estas du aŭ pli, oni povas kompari ilin. Do ni komparu:

Movada foiro	Kultura foiro
Multaj homoj +	Multaj homoj +
Multaj tabloj +	Multaj tabloj +
Belaj koloraj afiŝoj +	Belaj koloraj trinkaĵoj ++
Prezentoj pri projektoj -+	Prezentoj pri manĝokulturo +
Senpagaj varbiloj -	Senpagaj manĝaĵoj ++
Enuaj homoj -	Ebria homoj -+

Estas klare, ke la Kultura foiro venkas en tiu ĉi komparo! Sed bonŝance vi ne bezonas inter ili elekti, ĉar ili ne okazas samtempe.

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Se vi perdis nomŝildon, ŝtelu identecon de alia homo kaj komencu novan vivon.

Taŭro: Estus nun tro malfrue por aliĝi al la dimanĉa bicikla ekskurso.

Ĝemeloj: Bonvolu ne parki vian aŭton en la Scenejo aŭ Kunsideo dum koncertoj.

Kankro: Estos nostalgia diskejo, sed onidire ne tiom bona kiel iam en historio.

Leono: Ne, la akceptejo ne printos vian mem verkitan libron.

Virgulino: Post kultura foiro vi ne plu estos.

Pesilo: Vi transiris landlimojn malparkvante kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Malsukceso pri flirtado? Koko Poso ankoraŭ estas libera.

Spencjo: Dek bovinoj provos veki vin, sed ili ne sukcesas.

Sagitario: Ne estas vera IJK, se vi ne parolas kun homo el ĉiu mondoparto ĉiutage.

Kaprikorno: Se mankas ŝmiraĵoj en la manĝejo, ŝmiru vian panon per supo.

Akvisto: Ne iru tro longe al la necesejo, eble vi maltrafos surprizan koncerton!

Fiŝoj: Aŭgusto estas bona monato por ekstere reprezenti vian poŝtmarkkolekton.

Programo

	<u>Manĝejo</u>	<u>Ekstere</u>	<u>Scenejo</u>	<u>Filmejo</u>	<u>For</u>
08:00	Matenmanĝo				
09:00	Novula programo	Tajĵi			Bicikla ekskurso
10:00	Tabloludoj por komencantoj	Kurso por progresantoj			landlimoj
11:00					
12:00	Tagmanĝo				
13:00					
14:00	Ekstera reprezentado	Kurso biciklado	Cha-cha-cha	La Olsen-Bando	
15:00		Ultima frisbeo	Baĉato		
16:00			Movada foiro		
17:00					
18:00	Vespermanĝo				
19:00					
20:00			Kultura foiro		
21:00					
22:00	Trinkejo	Homlupo	Nostalgia diskejo		